

 <p><b>Universala Esperanto- Asocio</b></p>	 <p><b>ARTO, PERFEKTIGO KAJ LA RILATO INTER AMO KAJ POMOJ</b></p> <p><b>Estrara Subteamo: MOVADO</b></p>
--	--

*Estrara Komunikado EKO 2017-12 sendita el Budapeŝto, la 7an de majo.*

*Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

## AMO unuafoje en la ‘granda pomo’

Alekstera agado, kaj aparte reprezentado de nia organizaĵo ĉe internaciaj instancoj (ekzemple, UN kaj Unesko) estas unu el niaj kernaj agadkampoj: pliprestigiĝo, internacia kunlaboro kun aliaj similcelaj organizaĵoj kaj organiza plifortigiĝo estas inter la ĉefaj pozitivaj rezultoj de efika reprezentado.



Por krei pli da konscio pri la graveco de tiu ĉi agado per interŝanĝo de spertoj, konoj, konsiloj, UEA okazigos la unuan AMO-seminaron komplete dediĉitan al eksteraj rilatoj (Novjorko, 26a-27a de aŭgusto 2017). Veronika Poór, Sara Spanò kaj Humphrey Tonkin kungvidos la seminarion.

Kadre de la dutaga seminario okazos sesioj kaj aktivaĵoj pri la jenaj ĉefaj subtemoj: ĝenerala enkadriĝo de la agadkampoj kaj ĝiaj ĉefaj celoj laŭ strategia vidpunkto; distingo kaj interligiteco inter informado kaj eksteraj rilatoj; rekonstruo de la ĝisnuna historio de reprezentiĝo de UEA ĉe internaciaj instancoj kaj analizo de la nuna stato; konsiloj por bona reprezentado kaj por flanka informa agado; identigo de nunaj kaj estontaj defioj rilataj al tiu ĉi aparta flanko de alekstera agado.

## Arta Trezorejo lanĉita

Lastatempe mi lanĉis novan retejon, dediĉatan al originala kaj tradukita verkado. La celo estas krei allogan paĝon por ĉiuj verkistoj, kie ili povu prezenti siajn verkaĵojn al la publiko. Vi povas viziti tiun retejon ĉe [verkoj.com](http://verkoj.com). La enhavo ankoraŭ malabundas, kaj pluaj kontribuadoj estas bonvenaj. Ĝis nun aliĝis kelkaj verkistoj kaj iom post iom la enhavo pliriĉiĝas. Ĉu vi volas publikigi ion en tiu retejo? Se jes, bonvolu kontakti min – la retadreso troveblas en la retejo.

Amir Naor

The screenshot shows the website 'VERKOJ' with a dark purple header. The word 'VERKOJ' is written in large white letters. To the right of the text is an illustration of a desk with a pen holder, a small box, and a pen. A 'Search' button is in the top right corner. Below the header is a dark blue navigation bar with links: 'Hejmo', 'What is Esperanto', 'Verkistoj', 'Bildrakontoj', 'Laŭteme', and 'Kontaktu'. The main content area has a light yellow background and contains the following text:

Multaj verkistoj kontribuis kaj konstante kontribuas al la Esperanta kulturo. Ili ne agas pro ekonomiaj konsideroj, sed male: kreado en Esperanto postulas, ke ili investu multe da tempo kaj rimedoj, kelkfoje eĉ fronte al indiferenta kaj nekomprenema ĉirkaŭaĵo. Ili agas nur pro la amo al la literaturo kaj al la lingvo, kaj sentas, ke ili plenumas gravegan taskon. Oni povas konsideri ilin naivuloj kaj nereaj homoj, sed dum la tempopaso ili donacis al Esperanto veran, neatenditan trezoron – originalajn kaj riĉajn literaturon kaj poezion, kiuj havas memstaran valoron per si mem en la monda kulturo. Tiu ĉi retejo estas dediĉita al ili. Ĝia celo estas igi iliajn verkojn alireblaj al la vasta publiko.

Do, kiel komenci?

La enhavo de la bonkvalita retejo:

**Hejmo:** Tiu enirpaĝo havas laŭdirinde koncizan tekston (unu ekranon) kun elektitaj plusaltoj.

**What is Esperanto:** Jen anglalingva teksto “Kio estas Esperanto” (alilingvaj tekstoj supozeble bonvenos – ne povos temi pri simpla traduko)

**Verkistoj:** momente kun sep verkistoj, aldonu ankaŭ vin mem!

**Bildrakontoj:** momente videblas nur unu, sed multaj esperantistoj verkas desegne.

**Laŭteme:** proponas saltojn al dek du temaj aliroj al la enhavo, kiu ne alireblas senpere el la enirpaĝo

**Kontaktu:** retadreso de la paĝara kreinto.

La retejo estas bone rigardebla en saĝtelefonoj; havas la potencialon por interaktivado, por lasi komentojn aŭ proponi recenzojn de aperigitaj verkoj.



## Somera propono de la Esperanto-urbo

Esperanto-kursoj en Herzberg am Harz -- la Esperanto-urbo, estas anoncigitaj en du sinsekvaj someraj periodoj -- inter 9-15 kaj 15-22 julio 2017 sub la nomo Semajnoj de Esperanto-Perfektigo (SEP). La urbo

troviĝas meze en Germanio en la bela Harz-montara regiono. En la urbo jam ekzistas Esperanto-infrastrukturo, ekz. Esperanto en la muzeo, multlingva libroangulo en la urba biblioteko, esperantlingva hotelo *Zum Pass*, arkivoj kaj granda biblioteko, muzik- kaj filmkolektaĵo, kelkaj esperantlingvaj promenvojoj kun esperantlingvaj informtabuloj, ktp.

Antaŭtagmeze okazos lingvaj kursoj laŭ diversaj niveloj kaj por ĉiuj aĝogrupoj. Posttagmeze okazos ekskursoj, vizitoj, apartaj kursoj, ekz. pri pentroarto far eksterlanda pentroartisto. Se eblas, bv. kunporti viajn biciklon kaj naĝvestaĵojn -- bona naĝlago tuj apudas. Komune ni faros interesajn ekskursojn, ekz. al *Documenta* en Kassel, viskifabriko en Zorge/Harz, eŭropa panmuzeo, ktp. Ni ofertas migradojn en la proksima montaro.

Jam alvenis aliĝoj el eksterlando: nome el Ĉinio, Kongolando, Svislando kaj Pollando. Kelkfoje ni ofertas komunajn manĝaĵojn en la bela Esperanto-ĝardeno. Povas esti tre favorprezaj kursoj, ekz. se vi tranoktos en tendoj aŭ apartamentoj. Ekzistas hoteloj en la proksimeco laŭ diversaj prezkategorioj. Kiu aliĝas ĝis la 10a de majo ŝparos. Ni proponas kelkajn stipendiojn kaj rabatojn por diversaj membrokategorioj.

Hejmpaĝo, priskribo de la evento, aliĝilo: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=61460753>

Detalaj informoj: <http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=25764689>



ICH / Germana Esperanto-Centro

Vortoj: 560

=====000000=====

Ĉi tiu komunikado estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill@gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.